

Maciej Paweł Jaskot

Ĉu veraj aŭ falsaj amikoj? Leksikaj (mal)koincidoj en la tradukado inter la hispana kaj Esperanto

Resumo

Tiu ĉi artikolo titolita “Ĉu veraj aŭ falsaj amikoj? Leksikaj (mal)koincidoj en la tradukado inter la hispana kaj Esperanto” ekestas de la intereso de la aŭtoro rilate al leksikaj fenomenoj observeblaj inter similaj lingvoj. La artikolo komenciĝas per enkonduko en la temon de falsaj amikoj, post kiu sekvas prezento de difinoj de la pritraktata fenomeno. Poste la aŭtoro prezentas sian proponon de klasifiko de hispanaj-esperantaj falsaj amikoj. La priskribometodo de la fenomeno de falsaj amikoj estas simpla. Estis selektitaj esperantaj vortoj, kiuj laŭ la aŭtoro – pro siaj grafika aŭ akustika formo – povas konfuzi parolanton de la hispana. La aŭtoro estas konscia, ke la proponita elekto koncernas *ebajn* falsajn amikojn pro tio, ke oni disponas pri neniam studoj povantaj konfirmi kiom ofte ripetiĝas la misutiligo de iu esperanta vorto uzita kun hispandevena signifo.

Summary

“False or real cognates? Lexical coincidences and differences in Spanish-Esperanto translation”

This paper stems from the author’s interest in lexical phenomena observable in similar languages. It starts by discussing the concept of false cognates, followed by the corresponding definitions. The author states his proposed classification of the Spanish-Esperanto false cognates. The way in which false cognates are described is simple. There is a selection of words in Esperanto that can be confusing (either because of how they are written or how they sound) for the Spanish speaker. The author is aware of the fact that the proposed selection is only one of the *possibilities* of false cognates, given the fact that there are no studies about the frequency of misuse of Esperanto words when their Spanish-related meaning is in the background.

My conclusion is that the problem of a language for international communication presents itself as the conflict between a planned language, Esperanto, which is known to function to the satisfaction of its users, and a hegemonic national language, which, as we all know, is, today, English.

André Martinet

Los idiomas son como cauces de la actividad espiritual que en ellos se pone a fluir, pero cauces vivos y dotados de un oscuro poder de orientación que les hace conducir la líquida energía hacia campos sedientes e ignorados.

José Ortega y Gasset

1. Enkonduko

La temo de la falsaj amikoj de la tradukisto ĉiutage estas fonto de problemoj por multaj homoj: ekde lingvistoj profesiaj ĝis studentoj de fremdaj lingvoj. En la nuntempa mondo nin ĉiujn ĉirkaŭas almenaŭ kelkaj lingvaj sistemoj, kiuj diversmaniere interplektiĝas kun nia(j) patrolingvo(j). Tiamaniere, senĉese ni troviĝas en situacio de harmonia aŭ malharmonia interago de du (aŭ pli ol du) kodoj. Ne temas tamen pri situacio tute nova, ĉar

La homo havas kapablon je multilingveco. Ekzistas neniu lingvo krom la patra, kion oni ne povus ellerni. La grandega varieco de la lingvoj en la mondo ebligas al ĉiu homo lerni ilin ĉiujn. La multilingveco de la homaro ligiĝas kun la povo de ĉiu persono paroli diversajn lingvojn. (Wandruszka 1980: 8)

Esperanto, miaopinie, perfekte spegulas la enan kapablon de la homo je multilingveco, je plena sinesprimo pere de tia instrumento kiel lingvo. Krome, Esperanto estas tre interesa kazo por lingvisto, ĉar en ĝi videbliĝas multaj lingvaj procezoj troveblaj en pluraj lingvokodoj. La tiel nomata artefariteco de la Internacia Lingvo, ne devus kiun ajn timigi, ĉar:

Niaj lingvoj ne estas monosistemoj: ĉiu el ili estas kunmetaĵo de lingvoj, ĉiu estas siaspeca plurisistemo. Ekzistas ja la ebleco lerni lingvojn de aliaj popoloj, aliaj kulturoj en la lernejo, en la eksterlando, en nova patrujo. La plimulto de homoj parolas, eĉ se ne tute perfekte, du aŭ pli da lingvoj. Tiel do, bilingveco aŭ multlingveco de unuopaj homoj, de tutaj familioj aŭ popoloj estas unu el la plej gravaj socilingvistikaj problemoj de niaj tempoj. (Wandruszka 1980: 9)

La temo falsaj amikoj koncernas tradukistojn kaj studentojn, sed pri ĝi interesiĝis ankaŭ lingvistoj kaj lingvofilozofoj. Ĉiuokaze, ofte oni pritraktis la temon nur el praktika flanko. Nome, oni ŝajne konsideris, ke “la problemoj” de leksikaj konfuzoj malaperos, kiam la lernanto de fremda lingvo atingos sufiĉe altan nivelon de lerteco en du (aŭ pli) lingvaj sistemoj. Eble pro tio, en la vasta bibliografio pri la fenomeno de falsaj amikoj, kies redaktadon kunordigas profesoroj Ryszard Lipczuk kaj Daniel Bunčić el la Universitato de Bonn¹, troveblas ĉefe vortaroj kaj ekzemploj de tekstoj enhavantaj kazojn de falsaj amikoj. Preskaŭ malestas sciencaj analizoj de la fenomeno.

Interesiĝo pri falsaj amikoj radikas en miaj personaj spertoj. La kontakto kun la Internacia Lingvo estis por mi mejloŝtono en la lerno-procezo kaj kompreno de novaj lingvaj sistemoj. En mia doktora disertaĵo, mi asertas ke Esperanto – kiel planlingvo enkorpiganta leksikajn elementojn el diversaj lingvoj – estas la perfekta materialo por komparostudoj inter ĝia vortoprovizo kaj tiu de ĝiaj fontolingvoj.

2. Kio estas falsaj amikoj?

En artikolo titolita *Über die Natur natürlicher Sprachen* eldonita en 1975, la aŭstra sciencisto Mario Wandruszka (1975) rilatas sin al grava teoria problemoj kiun konstituas en lingvistiko la falsaj amikoj. Kvankam tiu fenomeno estis jam observita en la frua dudeka jarcento, antaŭ

1 <http://www.lipczuk.buncic.de>

Wandruszka neniu pristudis ĝin el pure teoria perspektivo por ĝin klarigi. Jam en 1969 en la libro *Sprache: vergleichbar und unvergleichlich*, Wandruszka (1976) konstatis:

Tiu, kiu konsideras lingvojn kiel sistemojn kaj volas ilin prezenti kiel arojn da formoj kaj funkcioj devas tuj alfronti la demandon: “Kiel eblas la polisemio?”

Wandruszka tiuokaze analizis la problemon de “leksika pluso” de iuj lingvoj (specife de la germana), sed en siaj konsideroj li koncentriĝis pri tio, kion poste li utiligis en siaj esploroj pri falsaj amikoj, nome pri la malsistemeco de la lingvoj. Pri traktante la neregulan distribuon de la germanaj vortoj *See* kaj *Meer*, Wandruszka demandis al si mem:

Ĝis kiu punkto apartaj formoj kaj strukturoj de iu lingvo atestas pri speciala lingva bildo de la mondo? Ĝis kiu punkto ili estas hazardaj, el la vidpunkto de la rezulto?

La malsistemeco (kaŭzita ĉefe de polisemio kaj polimorfismo) kaj hazardo, kune kun kelkaj eksterlingvaj faktoroj, reaperas en postaj verkoj de profesoro Wandruszka kiel ĉefaj trajtoj de naturaj lingvoj.

Oni devas preni en konsideron la fakton, ke se la polisemio estas decida faktoro por ke la malsistemeco okazu ene de la sistemo, ĝi estas eĉ pli grava se ni konsideras ĝin el la vidpunkto de interlingva pruntado (kiu estas la fonto de plejparto de falsaj amikoj). En tiu okazo aplikeblas solvoj pri lingva pruntado proponitaj de Schulte-Herbrügen (1978). La germana lingvisto substrekas ke se vortoj akiras novajn signifojn dum sia uzado, ili ja akiras multoblajn signifojn, nome polisemion.

Dum la uzado, en multaj kazoj, nunaj signifoj estas anstataŭataj per novaj. La semantika ŝanĝo bone observeblas ene de unu lingva sistemo. Tamen, observante du malsamajn sistemojn, la procezo estas multe pli evidenta kaj forta ĉar ja la lingva pruntado konsistigas unu el la formoj de signifoŝovo. Unuflanke la origina vorto daŭre funkcias en la origina lingvo, aliflanke ĝi estas enkorpigata en la novan lingvon, en kiu ĝi ekhavas novan (ofte deformitan) signifon (ĉar ĝi kovras nur unu semantikan interspacon); sekve en la depruntanta lingvo, la vorto daŭre evoluas laŭ la reguloj de tiu ĉi lingvo. Tiamaniere, dum la signif-

ato de la vorto ŝanĝiĝas, la signifanto pli-malpli restas senŝanĝa, kio ebligas la aperon de leksikaj falsaj amikoj.

3. Kiel difini falsajn amikojn?

Kompreneble ekzistas multnombraj difinoj de falsaj amikoj. Ĉiuokaze indas referenci al la unua, pli vaste konata difino – al tiu proponita de Maxime Koessler kaj Jules Derocquigny en sia libro *Les faux amis ou les trahisons du vocabulaire anglais*, en 1928:

Sont des faux amis du traducteur ces mots qui se correspondent d'une langue à l'autre par l'étymologie et par la forme, mais qui ayant évolué au sein de deux langues et, partant de deux civilisations différentes, ont pris des sens différents.

Falsaj amikoj de la tradukanto estas tiuj vortoj kiuj korespondas de unu lingvo al alia laŭ etimologio kaj laŭ formo, sed kiuj, evoluante sine de du lingvoj kaj ekirante el du malsamaj civilizoj, alprenis malsamajn signifojn.

Tiu ĉi unua kaj “klasika” difino de falsaj amikoj enhavas tri fundamentajn aspektojn renkonteblajn en preskaŭ ĉiuj postaj difinoj: komunan devenon, formon kaj signifon. Alia, klasika difino de la falsaj amikoj estas tiu proponita de Mario Wandruszka en la artikolo *Die falschen Freunde des Übersetzers*:

Die Worten, die in zwei oder mehreren Sprachen die gleiche oder eine ganz ähnliche Form haben, so daß wirlichtsinnigerweise glauben können, sie müßten auch dasselbe bedeuten.

La vortoj kiuj en du aŭ pli multaj lingvoj havas egalan aŭ tre similan formon, tiel ke ni facile povas kredi, ke ili devus havi la saman signifon.

Temas pri la sama difino utiligata en liaj postaj artikoloj. La falsaj amikoj estas do, ĝenerale dirite, vortoj similaj laŭ formo, sed kun malsamaj signifoj.

Analizante la difinojn de aliaj aŭtoroj, videbliĝas, ke preskaŭ ĉiuj samopinias kun la propono de Wandruszka. Tamen, post pli profunda analizo evidentiĝas, ke tutcerte ekzistas pli da vortunuoj, kiujn oni povus konsideri falsajn amikojn.

Kvankam Kudela (1980), Cartagena kaj Gauger (1986), kaj Wilczynska (1989) parolas pri falsaj amikoj kiam ili aludas al vortoj, el iliaj studoj oni komprenas, ke la fenomeno de falsaj amikoj signifas leksikan interferon en pli vasta senco. Fakte, adoptante kiel elirpunkton la psikolingvistikan difinon (*définition psycholinguistique*) de Wilczynska, eblas alveni al la konkludo, ke la falsaj amikoj estas iu tipo de leksika interfero aperanta pro la influo de la patr(in)a lingvo (aŭ pli precize, sed daŭre ĝenerale: pro la influo de iu leksikosintaksa strukturo miskopiita el la unua/dua/tria, ktp. lingvo parolata de iu persono) dum la procezo de kodigo-malkodigo de alia lingvo. La lernanto de nova lingvo havas tendencon ĝin vidi kiel simplan alternativon de jam konata lingva sistemo:

Bref, l'apprenant recevra la langue étrangère surtout comme une alternative structure lexicale et sémantique à son système linguistique. Parler d'une langue comme d'une vision du monde ne sera pour lui qu'une belle métaphore. [...] le système sémantique de sa langue maternelle, solidaire de la mémoire sémantique de l'apprenant et de sa structure cognitive en général, constituera un filtre inconscient qui protégera son ego linguistique en tant que partie de sa personnalité (Wilczynska 1989).

Mallonge, la lernanto ricevos la fremdan lingvon esence kiel leksikan kaj semantikan strukturon alternativan al la propra lingva sistemo. Paroli pri lingvo kvazaŭ vizio de la mondo ne estos por li pli ol bela metaforo [...] la semantika sistemo

de lia patrina lingvo, solidara kun la semantika memoro de la lernanto kaj de lia kogna strukturo ĝenerale, konsistigos nekonscian filtron kiu protektos lian lingvan egoon kvazaŭ parton de lia personeco.

Similan aliron prezentas Kudela (1980) klarigante la “processus de désétymonisation”, kiun ni frontas dum la malkodigo (“au plan de décodage”), kiel problemon de interpretado de fremda lingvo. Tial do Kudela parolas pri arkisemantemo ĉe la nivelo de signifato kaj pri arkileksemo ĉe la nivelo de signifanto. Kaj ĝuste tiuj du faktoroj kaŭzas konfuzon inter la lernantoj. La arkileksemo konsistas el pli-malpli komunaj formaj trajtoj (sameco de signifantoj) en du malsamaj lingvoj dum la arkisemantemo estas figuro rilatanta al la enhavo (signifato). Tiu ĉi figuro estas ofte malprave kreata de la lernanto, kiu havigas al lernata vorto, simila al iu jam konata vorto, signifojn ne ekzistantajn en la nova lingvo. Tiamaniere, se per la arkileksemo eblas paroli pri similaj formoj (signifantoj), la kreado de similaj semantikaj enhavoj (signifatoj) surbaze de arkisemantemo okaze de falsaj amikoj estas procezo neebila. Per tiu difino de falsaj amikoj kiel iuspeca fenomeno de leksika interfero kompreneblas, ke la fenomeno ne konsistas nur el iu simileco inter du signifoj kaj malsimileco inter signifoj specifaj por unu konkreta vorto. Pli precize oni diru, ke temas pri altrudado de strukturoj (ĉefe semantikaj, sed ankaŭ sintaksaj kaj morfologiaj) de unu lingvo al alia. Difininte tiel la falsajn amikojn, necesas konsideri kiel falsajn amikojn ankaŭ tiajn kazojn kiel tiuj proponitaj de Cartagena kaj Gauger (1986): ekzemple la anglajn vortojn *dream/sleep* kaj la hispanan *sueño* aŭ la germanan *der Brief* kaj la hispanan *la carta*. Kvankam ĉikaze malestas forma simileco kaj semantika diferenco, temas ja pri falsaj amikoj, ĉar observeblas tendenco diri **die Brief* laŭ la modelo de la hispana lingvo (ina genro de la hispana substantivo). Cartagena kaj Gauger, kaj Breitzkreuz vastigas la difinon ankaŭ al paragrafoj, t.e. al kazoj kiam la grafio de du vortoj povas kaŭzi konfuzon, ekzemple: esperante *orkestro* kaj hispane *orquesta* aŭ esperante *artikolo* kaj hispane *artículo*.

Pro la samaj kialoj inkludendas en la difinon ankaŭ kazoj kiel:

- a) sintaksaj interferoj inter lingvoj. Ekzemple: *voy a hacer algo interesante* ne estas esperante *mi iros fari ion interesan* aŭ *voy coleccionando discos* ne signifas *mi iras kolektante diskojn*;
- b) idiomaĵoj, proverboj, kiuj ja konsistas el vortoj neŭtralaj laŭ la signifo, sed kunmetitaj povas kaŭzi komprenoproblemojn;
- c) vortaj situacioj kaj konotacioj. Ekzistas ja vortoj, kiuj estas forte ligitaj al kulturo de iu komunumo kaj evokas specifajn signifojn aŭ aludas al eksterlingva realaĵo; ili povas ankaŭ distingiĝi per diastrataj aŭ diafazaj faktoroj. Renkonteblas plie esprimoj ekzistantaj en du lingvoj, sed uzataj en masalamaj situacioj kaj kuntekstoj, ekz. *¿cu ne?* fine de esperanta frazo kaj *¿verdad?* en la hispana. La uzo ja de tiuj ĉi du formoj malsamas en la menciitaj lingvoj. Whitely (1986: 325) substrekas krome, ke “cognates [...] can differ in their stylistic level of usage: *aumento*, *socorro*, *denunciar* are rather ordinary Spanish words whose English cognates *augment*, *succor*, *denounce* are ‘fancy’ and absent from some speakers’ vernaculars” (*parencaj vortoj [...] povas malsimili en sia stila uzonivelo: aumento, socorro, denunciar estas iom ordinaraj hispanaj vortoj kies parencaj vortoj augment, succor, denounce estas ‘snobaj’ kaj mankas en la ĉiutagaj lingvoj de iuj parolantoj*).

La opinioj kaj difinoj prezentitaj supre elmontras, ke ekzistas konfuzo de kriterioj kiu miaopinie estas motivita de daŭre limigita nombro de studoj de tiu fenomeno kaj de la manko de ĝenerala alproksimiĝo al la fenomeno flanke de lingvoesploristoj. Aperas, do, multaj demandoj, inter kiuj menciendas la sekvaj:

- Kiujn aspektojn de la fenomeno oni devas konsideri?
- Ĉu ni sekvu la etimologian kriterion aŭ simple konsideru la forman similecon?
- Ĉu temas nur pri interlingva fenomeno?
- Ĝis kioma grado oni konsideru la homografion, paronimion kaj polisemion kaj kiel ili influas la aperon de falsaj amikoj?

Ŝajnas esence akordigi malsamajn opiniojn kaj alproksimiĝojn al tiu fenomeno por prezenti sufiĉe detalan klarigon. Tiel, mi konsideras falsajn amikojn kiel grandan grupon de interferoj leksikaj (kaj sintaksaj, pri kiuj dume mi ne okupiĝas), kiuj povas okazi inter du lingvoj.

4. Falsaj amikoj kaj rilato signifato-signifanto

Analizante la leksikan sistemon de iu ajn lingvo malfacilas observi, ke unu signifanto akordiĝas nur kun unu signifato. Ĉi-speca monosemia rilato estas nekutima, kvankam en iuj lingvoj, kiel ekzemple Esperanto, observeblas forta tendenco al ĝia respekto². La naturaj lingvoj donas multajn ekzemplojn de esprimoj, en kiuj unu vorto estas uzata kun malsamaj semantikaj nuancoj. En tiuj konstruoj tiaj vortoj funkcias kiel elementoj havigantaj al la ĝenerala senco grandan kvanton de informoj per kiuj estas reinterpretata la lingva bildo de la mondo de iu lingva komunumo³, ekzemple en la hispana: *cabeza de agua*, *cabeza de familia*, *cabeza de la Iglesia*, *cabeza de turco*.

Ĉu ne estus do pli simple havi unu signifanton al kiu respondus unu signifato? Al tiu demando oni povas respondi kun du argumentoj. Unuflanke, la homa cerbo ne kreas signifojn hazardmaniere, sed ĝi establas asociajn kampojn per lingva percepto de diferencoj kaj similecoj inter objektoj de realaĵo. Aliflanke, en la lingva sistemo ekestus longega listo de signifantoj kaj ĉiu el ili havus nur unu signifaton. Tamen, pro

2 Ekzemple: ĝermana/germana, orgeno/organo, pezi/pesi

3 Interesaj estas la rimarkoj de I. Koutny (2010): “La lingva bildo de la mondo aperas en diversaj flankoj de la lingvo. Eblas spuri ĝin en la gramatiko, leksiko, frazeologio kaj pragmatiko (Anusiewicz k.a. 2000 proponas ampleksan kadron por esploroj). Leviĝas la demandoj: Ĉu Esperanto entute prezentas iun propran bildon de la mondo aŭ nur spegulas aliajn; se jes, kian, kaj kiun rilaton tio havas kun la lingva bildo de aliaj lingvoj, kaj ĉu ni pensas en tiuj specialaj kategorioj, kiam ni uzas Esperanton? Homoj ne konantaj Esperanton ofte objetas, ke ĝi ne havas kulturon. Tamen la lingvokomunumo – dum sia pli ol centjara ekzistado – nature kreis sian karakterizan kulturon. Kvankam ĝi ne estas tiel ampleksa kiel la naciaj kulturoj, ĉefe la ĉiutagaj aferoj, realaĵoj praktike mankas (kp. Koutny 1998), ja Esperanto konsistigas la duan kulturon por siaj parolantoj, kiuj ĉiuj vivas en etnolingvaj socioj. Esperanto funkcias ĉefe en internacia kaj interkultura komunikado. La Esperanta kulturo plenumas similan rolon al la naciaj, ĝi estas la bazo por efika komunikado, kompreno de literaturaĵoj kaj ŝercoj. Melnikov (1992, 2001, 2003 kaj 2004) konstatas surbaze de siaj esploroj, ke Esperanto-kulturo trovis sian respeguliĝon en la lingvo, unuavice en la kulturŝarĝitaj vortoj”.

ena lingva ekonomio, kontrolanta la kreadon de novaj signoj, tiu solvo estas maloportuna. Kontraŭe: estas ja pli oportune kaj ekonomie havi nur unu signifanton por difini malsamajn aspektojn de la realaĵo, ekzemple:

hispane <i>vaso</i> ⁴	esperante (pluraj vortoj)
1. vasija, ánfora, jarrón	1. <i>vazo</i>
2. vasija cilíndrica empleada para beber líquidos	2. <i>glaso</i>
3. casco del barco	3. <i>ŝelo</i>

Tabulo 1: Unu signifanto en la hispana kaj multaj en Esperanto

La fenomeno de la diversigado de signifoj apartenantaj al unu signifanto estas tre komuna en naturaj lingvoj kaj ne havas escepton⁵; ĝi estas, prefere, unu el la plej uzitaj mekanismoj koncepti la homan sperton kaj percepton.

5. Klasifiko-propono de falsaj amikoj inter Esperanto kaj la hispana

En lingvoj kiuj similas unu al la alia laŭ ilia vortaro, estas dekoj aŭ eĉ centoj da vortunuoj konsidereblaj kiel falsaj amikoj. Plejofte ne temas pri izolitaj leksikaj unuoj, sed pri vortoj kun similaj radikoj. Tiamaniere eblas paroli pri homonimoj, homofonoj kaj sinonimoj (aŭ partaj sinonimoj) interlingvaj. Ĉiuj tiuj “kazoj de malsama semantika naturo”⁶ povus nomiĝi do falsaj amikoj de la tradukisto. Pro la similecoj sur la esprimnivelo (sekve ESN), ĉi tiuj vortoj provokas asociojn inter si kaj reciproke rilatiĝas. Tamen, sur la enhavnivelo (sekve ENN) aŭ dum la ĉiutaga lingvouzado evidentiĝas, ke aŭ plene aŭ parte ili

4 Difinoj el la hispana *Diccionario de uso del español* de María Moliner.

5 „Омонимия не может рассматриваться, как это имело место ранее в некоторых работах, как “дефект” или “болезнь” языка, а представляет, по мнению Л.В.Малаховского, одно из и его фундаментальных свойств, “которое должно приниматься во всех теоретических концепциях языкознания, а также при решении различных прикладных задач”. (Малаховский 2009: 15)

6 Laŭ la originalo: “семантически несколько разнородные случаи” (Akulenko 1969)

malsimilas laŭ la signifo. Kiel estis menciite supre, la termino “falsaj amikoj”⁷ havas multajn interpretojn. Mi kredas, samopiniante kun Dhzumberovna Khutsishvili (2010), ke eblas precizigi la fenomenon parolante pri “interlingvaj homonimkarakteraj kongruoj”. Tiu ĉi longa termino proksimigas la kernan ideon de la fenomeno de falsaj amikoj: la similecon, sendepende de ĝia speco. Oni ne forgesu, tamen, ke tiu termino rilatas plejparte al leksikaj falsaj amikoj.

En ruslingva scienca literaturo pri la falsaj amikoj de la tradukisto oni emfazas la terminon “interlingva paronimio” (межъязыковая паронимия). Siavice, Shmeliov (2008) notas ke la termino “paronimio” estas

7 Menciindas aliaj vortumoj uzatajn en scienca literaturo por priskribi la analizitan en tiu ĉiu artikolo fenomenon:

En hispanlingva literaturo:

- falsos amigos, falsas etimologías: Torrents dels Prats 1976, Lodaes 1987, San Juez 1991
- falsos cognados: Orellana 1987
- falsos parecidos: Díaz González 1975
- léxico equívoco, palabras equívocas, falsos sinónimos: Criado del Val 1972
- palabras de fácil confusión: Merino 1990
- trampas: Davini y Pellizzari 1992

En anglalingva literaturo:

- semi-false friends: Kirk-Greene 1992
- false friends and cognates: Breitzkreuz 1973
- words which are meretriciously similar: Bantas 1993
- deceptive cognates: Gociman kaj Bantas 1976
- false cognates: Whitely 1986

En itallingva literaturo:

- falsa analogia: Sañé y Schepisi 1992
- trappole: Davini y Pellizzari 1992
- falsi amici: Sañé y Schepisi 1992
- ambigue affinità: Sañé y Schepisi 1992

En franclingva literaturo:

- amis perverses, amis partiels, amis absents: Wilczynska 1989
- faux amis: Kudela 1980, Debysser 1971
- faux frères: Bertrand 1979

En germanlingva literaturo:

- falsche Freunde: Wandruszka 1976, Cartagena kaj Gauger 1986

En portugallingva literaturo:

- heterossemânticos: Santos Silva 1992
- palavras amigas da onça: Downes 1978

En ruslingva literaturo:

- ложные друзья: переводчика
- межъязыковые омонимы: Suprun 1958
- межъязыковые паронимы: Akulenko 1969
- межъязыковые соответствия омонимичного типа: Dzumberovna Khutsishvili 2010

uzata en la lingvistika literaturo kun du malsamaj signifoj (unu malpli kaj la dua pli vasta). En la unua kazo, paronimoj estas nomataj du vortoj kiuj havas la saman radikon kaj similan signifon, kiel ekzemple la hispanaj vortoj *clave/llave*. En la dua kazo, en kiu la termino estas komprenata pli vaste, paronimoj estas du vortoj similaj laŭ sia fonetika realigo, ekzemple la hispanaj verboj *adoptar/adaptar*. Rimarkindas, ke la dua kompreno de la paronimio, laŭ kiu kiel paronimojn oni komprenas vortojn sonantajn simile (kaj kies radikoj estas malsamaj) havas prefere subjektivan karakteron ĉar ja al iuj povas ŝajni similaj la hispanaj vortoj *soñar/señar* kaj al aliaj – *pasaje/peaje*.

Kaze de la interlingvaj paronimoj ŝajnas al mi, ke pli vasta komprenado de paronimio mem estas pli evidenta, ĉar dank'al tia kompreno kiel paronimojn eblas pritrakti vortojn apartenantajn al la sama vortkategorio, havantajn forman similecon kaj similan fonetikan realigon, sed diferencantajn laŭ la signifo, ekzemple: hispane *gas* kaj esperante *gazo* aŭ hispane *cacho* kaj esperante *kaco*.

En la scienca literaturo pri lingvokomparado, la interlingvaj paronimoj estas priskribataj kiel varianto de interlingvaj homonimoj aŭ kiel aparta kategorio.

Mi traktas la interlingvajn paronimojn kiel specon de falsaj amikoj, kiuj diferencas de interlingvaj homonimoj per malpli granda grado de formala kaj fonetika simileco.

Siavice, ŝajnas al mi ne tute taŭge paroli pri interlingvaj sinonimoj analizante vortojn de du aŭ pli da lingvoj, kiuj similas kaj laŭ la ESN kaj laŭ la ENN, sed malsamas laŭ ilia konotacio. La menciita jam Akulenko (1969) difinas interlingvajn sinonimojn (межъязыковые синонимы) kiel “vortojn el du lingvoj, kiuj estas tute aŭ parte samaj laŭ signifo kaj uzado (kaj do rezultas ekvivalentaj dum tradukado)”. Se ni volus uzi tiun difinon de Akulenko, ni devus kontrasti ĝin kun la partaj interlingvaj sinonimoj. La interlingvaj sinonimoj, fakte, prezentas nian malfacilon dum tradukado aŭ lernado. Kontraŭe, ni povus nomi ilin “amikoj de la tradukisto”, ĉar ili estas klara ekzemplo de pozitiva interfero pro la simileco sur la ESN kaj ENN, faciligante do la lernadon kaj komprenon de vortoj en la lernata lingvo. Temas do pri vortoj havantaj la saman etimologion, nome pri parencaj vortoj.

Tamen, la partaj interlingvaj sinonimoj, pro diferencoj sur la ENN (diferencoj en specifaj uzoj, signifonuancoj, uzokuntekstoj) kaj similaĵoj laŭ la ESN, kaŭzas la plej grandajn malfacilaĵojn en la laboro de la tradukisto, leksikografo kaj studento. Ili estas fonto de negativa interfero, manko de kompreno kaj apero de eraroj (ofte pragmatikaj).

La termino “partaj sinonimoj” estas uzata por priskribi vortojn kies signifo ne estas tute identa. En multaj kazoj, la du terminoj menciitaj supre fakte signifas la samon, sed ili rilatas al malsamaj teorioj aŭ aliaj metalingvaĵoj. Al tiu kategorio apartenas do vortoj havantaj la saman etimologion, sed kiuj tamen malofte estas komparataj en ĉiuj siaj signifoj; ofte ili formas homonimajn parojn de sememoj. Tial do, mi kredas ke temas pri kategorio meze de sinonimoj kaj interlingvaj homonimoj.

Komparante la vortprovizon de du lingvoj (L1 kaj L2) observeblas el la forma vidpunkto (same en la skribmaniero kiel fonetike) tri grandaj vortogrupoj:

- vortoj similaj,
- vortoj relative similaj,
- vortoj malsimilantaj grafie kaj fonetike.

Siavice, interlingve similaj vortoj laŭ sia semantiko klasifikeblas jene:

- vortoj esprimantaj la saman koncepton,
- vortoj iugrade signifantaj la samon,
- vortoj kun tute malsama signifo.

Jen la supra klasifiko en la formo de tabulo, laŭ Dzumberovna Khutsishvili (2010):

1. TUTA VORTARO								
2. vortoj similaj laŭ la ESN			3. vortoj parte similaj laŭ la ESN			4. vortoj malsimilaj laŭ la ESN		
5. vortoj identaj laŭ la ENN	6. vortoj parte similaj laŭ la ENN	7. vortoj mal- samaj laŭ la ENN	8. vortoj identaj laŭ la ENN	9. vortoj parte similaj laŭ la ENN	10. vortoj malsamaj laŭ la ENN	11. vortoj identaj laŭ la ENN	12. vortoj parte similaj laŭ la ENN	13. vortoj mal- samaj laŭ la ENN

Tabulo 2: Klasifiko de komparata vortaro de du lingvoj laŭ la rilatoj inter la ESN y ENN

La rilatojn inter la formo⁸ (F) kaj la signifo (S) de du vortoj (₁ kaj ₂) de du komparataj lingvoj eblas prezenti pere de la suba tabulo:

Formaj rilatoj → Semantikaj rilatoj ↓	$F_1 = F_2$	$F_1 \approx F_2$	$F_1 \neq F_2$
$S_1 = S_2$	1. $F_1 = F_2; S_1 = S_2$	2. $F_1 \approx F_2; S_1 = S_2$	3. $F_1 \neq F_2; S_1 = S_2$
$S_1 \approx S_2$	4. $F_1 = F_2; S_1 \approx S_2$	5. $F_1 \approx F_2; S_1 \approx S_2$	6. $F_1 \neq F_2; S_1 \approx S_2$
$S_1 \neq S_2$	7. $F_1 = F_2; S_1 \neq S_2$	8. $F_1 \approx F_2; S_1 \neq S_2$	9. $F_1 \neq F_2; S_1 \neq S_2$

Tabulo 3: Rilatoj inter la formo kaj la signifo de du vortoj el la komparataj lingvoj

Laŭ la formo eblas paroli pri:

- homoleksio ($F_1 = F_2$),
- paraleksio ($F_1 \approx F_2$) kaj
- heteroleksio ($F_1 \neq F_2$).

La semantikajn rilatojn oni povas grupigi jene:

- homosemio ($S_1 = S_2$),
- parasemio ($S_1 \approx S_2$) kaj
- heterosemio ($S_1 \neq S_2$).

Laŭ Dzumberovna Khutsishvili (2010), la interlingvaj, homonimecaj vortoj (falsaj amikoj) troviĝas en la ĉeloj n^o 4, 5, 7 kaj 8.

Tiel, pritraktendas la jenaj rilatoj⁹:

- homoleksemoj parasemantikaj ($F_1 = F_2; S_1 \approx S_2$),
- paraleksemoj parasemantikaj ($F_1 \approx F_2; S_1 \approx S_2$),
- homoleksemoj heterosemantikaj ($F_1 = F_2; S_1 \neq S_2$)
- paraleksemoj heterosemantikaj ($F_1 \approx F_2; S_1 \neq S_2$).

8 Kiel formon mi komprenas antaŭ ĉio la grafian formon, ĉar la realigado de fonemoj reprezentataj en la du lingvoj per la sama grafemo povas esti tute malsamaj.

9 Ĉi-supraj esperantlingvaj terminoj havas laborkarakteron.

La supre menciitaj kvar kategorioj enhavas tiujn vortojn, kiuj ĝenerale estas konataj kiel falsaj amikoj; tamen, el la vidpunkto de formaj kaj semantikaj rilatoj, temas ja pri malhomogena kategorio kaj indas priskribi tiujn kvar tipojn aparte.

Ni vidu pli detale la supre menciitajn kategoriojn:

Ĉelo n° 4 - homoleksemoj parasemantikaj ($F_1=F_2$; $S_1\approx S_2$)

En tiu ĉi kategorio gravas la simileco de la signifo. Pro ortografiaj diferencoj inter la hispana kaj Esperanto (regulaj finaĵoj) malfacilas multnombre trovi tiajn vortojn, ekz.: hispane *plato* ('teleró') kaj esperante *plato* 'objekto malpli dika ol larĝa kaj longa' (REVO) aŭ 'ĉio ajn, kio estas plata' (PIV 2005), aŭ hispane *regalo* ('donaco') kaj esperante *regalo* 'ago de tiu, kiu regalias' (PIV 2005).

Ĉelo n° 5 - paraleksemoj parasemantikaj ($F_1\approx F_2$; $S_1\approx S_2$)

Temas pri vortoj pli-malpli similaj laŭ la formo kaj la signifo. Aperas, tamen, la demando: "Ĝis kioma grado oni povas paroli pri simileco?" Mia opinio temas pri vortoj kiel hispane *amor* 1) 'sentimiento intenso del ser humano que, partiendo de su propia insuficiencia, necesita y busca el encuentro y unión con otro ser' 2) Tendencia a la unión sexual (RAE XXII) 3) (m. pl.) relaciones amorosas; kaj esperante *amoro* 1) 'la tuto de la voluptocelaj agoj' (hispane: 'el conjunto de las acciones que llevan a la voluptuosidad') (PIV 2005) kaj 1) 'sekskuniĝo' (hispane: 'coito') (REVO).

Ĉi-kaze videblas, ke la forma diferenco radikas nur en la -o finaĵo de la esperantaj vortoj (deviga markado de substantivoj en singularo) dum la signifo distingeblas per nuanco de la propra signifo, nome per plivastigo de la signifo de la esperanta vorto kompare kun la hispana¹⁰.

Ĉelo n° 7 - homoleksemoj heteroseantikaj ($F_1=F_2$; $S_1\neq S_2$)

Temas pri vasta kategorio. Inter du aŭ pli da lingvoj el la sama lingvofamilio (kiel Esperanto kaj la hispana - laŭ mia aserto) la

¹⁰ Tamen, la difino de REVO referencas al tre konkreta ago, dum amrilatoj havas sendube pli vastan signifon ol nura koito, ĉu ne?

vortoparoj aperas pro malsama etimologio aŭ pro signifoŝanĝo de la vorto dum evoluo de la koncernaj lingvoj. Ofte malfacilas trovi ankaŭ vortojn havantajn tute malsaman signifon en ĉiuj siaj signifoj.

CELO	
signifo hispanlingve (laŭ DRAE XXII)	signifo esperantlingve (laŭ REVO)
<ol style="list-style-type: none"> 1. m. Cuidado, diligencia, esmero que alguien pone al hacer algo. 2. m. Interés extremado y activo que alguien siente por una causa o por una persona. 3. m. Recelo que alguien siente de que cualquier afecto o bien que disfrute o pretenda llegue a ser alcanzado por otro. U. m. en pl. 	<p>Tio, kion oni celas</p> <p>(celi = aspirar a algo, proponerse algo)</p>
hispana etimologia komentario (laŭ Coromines 2008)	esperanta etimologia komentario (laŭ Cherpillod 1995)
Tom. del lat. <i>zēlus</i> ‘ardor, celo’, ‘emulación’, ‘celos’, y éste del gr. <i>zēlos</i> íd. (deriv. de <i>zēō</i> ‘yo hiervo’)	Vient du russe <i>цель</i> , allemand <i>Ziel</i> .

Tabulo 4: Komparo inter hispana kaj Esperanto de signifoj kaj etimologio de homografa vorto *celo*

Ĉelo n° 8 – paraleksemoj heterosemantikaj ($F_1 \approx F_2$; $S_1 \neq S_2$)

Al tiu kategorio apartenas multaj falsaj amikoj inter la hispana kaj Esperanto opinianta (kiel oni diskutis pli supre), ke eblas konsideri unuopajn signifojn de la vorto kaj ne ĉiuj el ili, ekzemple:

hispana vorto kaj ĝia signifo	esperanta vorto kaj ĝia signifo
CLAVO	KLAVO
<ol style="list-style-type: none"> 1. Pieza metálica, larga y delgada, con cabeza y punta, que sirve para introducirla en alguna parte, o para asegurar una cosa a otra (<i>esperante: najlo</i>) 2. Capullo seco de la flor del clavero. Es medicinal y se usa como especia en diferentes condimentos (<i>esperante: kariofilo</i>) 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Prem- aŭ tuŝbutono ĝenerale plata kaj pluropa (<i>hispane: botón</i>) 2. Unu el la butonoj de klavaro de tajpilo aŭ komputilo (<i>hispane: tecla</i>) 3. Plateto, kiun oni premas por produkti sonojn en muzikilo (<i>hispane: tecla</i>)

COTO	KOTO
<ol style="list-style-type: none"> 1. Terreno acotado (<i>esperante: ĉastereno</i>) 2. Mojón que se pone para señalar la división de los términos o de las heredades, y especialmente el de piedra sin labrar (<i>esperante: limŝtono</i>) 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Tero, polvo, miksita kun akvo, sur strato, vojo kaj similaj (<i>hispane: barro</i>)
PUTA	PUTO
<ol style="list-style-type: none"> 1. Prostituta (<i>esperante: putino</i>) 	<ol style="list-style-type: none"> 1. Profunda truo, fosita en tero, por tiri el ĝi akvon, kiu tien kolektiĝas pro subtera fonto aŭ trasorbiĝo (<i>hispane: pozo</i>)

Tabulo 5: Komparo de signifoj de tri vortoj hispanaj kaj esperantaj, similaj laŭ formo sed malsimilaj laŭ la signifo

Multajn respondojn al “malfacilaj demandoj” pri leksika analizo de du similaj lingvoj oni obtenas dank’al observado de fenomenoj de transiro kaj procezoj de sinkretismo. Temas pri teorio de rusa sciencisto V.V. Babaitseva (2000), kiun ŝi utiligis por esplori la temon de falsaj amikoj, resumante en du punktoj la klasifikon de ĉiuj fenomenoj nomataj falsaj:

- 1) La grado de simileco sur la ESN,
- 2) la grado de diferencoj sur la ENN.

Tiamaniere, dum la komparo de du similaj lingvoj, la ĉefa manifestiĝo de la traktata fenomeno estos la leksikaj unuoj similaj laŭ formo sur la ESN kaj malsimilaj sur la ENN.

6. Konklude

Lingva interfero kaj la fenomeno de falsaj amikoj estas temo same malnova kiel la tradukado mem, malgraŭ tio ke la unua termino por tiaj interferoj aperis nur en la 20-aj jaroj de la dudeka jarcento (*faux amis*, Koessler y Derocquigny, 1928).

Mi konsideras, ke utiligendas la metodologio de la sovetuniaj (kaj poste, ĝenerale dirite, ruslingvaj) lingvistoj (komencante per Akulenko

ĝis la propono de Dzhumberovna Khutsishvili el Kartvelio), kiuj enkondukis la terminojn межъязыковые паронимы “interlingvaj paronimoj” (kelkfoje ankaŭ parolante pri межъязыковые омонимы “homonimoj interlingvaj”) ĉar ĝia ampleksecio enkorpiĝas ĉiujn problemojn, kiujn oni povas alfronti dum la analizo de la fenomeno.

Substrekindas, ke mi ne konsideras falsajn amikojn kiel fenomenon negativan. Oni ne juĝu tion, kio devus esti pli pristudinda temo. La falsaj amikoj, aliflanke, estas abunda fonto por vortludoj. Mi okupiĝis pri la falsaj amikoj inter la hispana kaj Esperanto, ĉar laŭ mi ĝisnune la temo ne estis sufiĉe pritraktita el scienca vidpunkto.

Nenian dubon mi havas pri tio, ke pli profunda analizo de la fenomeno de falsaj amikoj povas utili ne nur sur la kampo de lingvistiko, sed ankaŭ kadre de aliaj sciencobranĉoj, ekz.:

- En la tradukado: “Kiel elimini la interferojn?”;
- En la studado de la “interlingvo” kreiĝanta dum la lernoprocezo de fremdaj lingvoj;
- En la instruado de fremdaj lingvoj al parolantoj de similaj lingvokodoj;
- En ajnaj studoj pri semantika ŝanĝiĝo;
- En la komprenado de nia mondopercepto (esprimata ja pere de lingvo!);
- En la pristudo de la mekanismoj de la parolo;
- En la kompreno de kiel ni komunikas kulturajn kodojn, ktp.

Per tiu ĉi artikolo mi ne celis elĉerpi la temon de falsaj amikoj inter Esperanto kaj la hispana, ĉar mi konscias ke la fenomeno de falsaj amikoj kaj ĝenerale dirite de la simileco inter la leksiko de du aŭ pli da lingvoj estas tre ampleksa kaj bezonas multe pli vastajn kaj profundajn studojn. Mi ja limigis min al pristudo de kazoj de falsaj amikoj baziĝante sur elektitaj ekzemploj; tiamaniere la artikolo atestas nur pri iu elirpunkto de la studoj pri la traktata tie ĉi fenomeno.

Espereble, tio kion mi prezentis utilos al estontaj studoj en la kampo de esperantologio.

Mi finu miajn konsiderojn per citaĵo el unu el miaj plej ŝatataj pensoj de fama lingvisto Roman Jakobson:

If we were to translate into English the traditional formula *Traduttore, traditore* as “the translator is a betrayer,” we would deprive the Italian rhyming epigram of all its paronomastic value. Hence a cognitive attitude would compel us to change this aphorism into a more explicit statement and to answer the questions: translator of what messages? betrayer of what values?

Se ni tradukus en la anglan la tradician formulon Traduttore, traditore kiel “la tradukanto estas perfidanto,” ni forprenus de la itala rima epigrama ĝian tutan paranomastan valoron. Sekve, kogna vidpunkto devigus nin ŝanĝi tiun aforismon en pli eksplicitan aserton kaj respondi al la demandoj: tradukanto de kiuj mesaĝoj? perfidanto de kiuj valoroj?

Cititaj verkoj

- Akulenko, V.B. [Акуленко, V.V.], Komissarchik, S.Yu. [Комиссарчик, С.Ю.], Rogerolova, R.V. [Погорелова, Р.В.] & Yuht, V.L. [Юхт, В.Л.] (1969). *Англо-русский и русско-английский словарь “ложных друзей переводчика”*. Москва.
- Álvarez Lugrís, Alberto (1997) *Os falsos amigos da tradução*. Vigo: Servicio de Publicacións da Universidad de Vigo.
- Babaitseva, V. V. [Бабайцева В.В.] (2000). *Явление переходности в грамматике русского языка*. Москва: Дрофа.
- Bantas, Andrei (1993). *False Friends. Capcanele limbii engleze*. București: Editura Teora.
- Bertrand, J. (1979). *Dictionnaire des faux frères: 800 exercices avec leur solution, 50 expressions étrangères avec leur traduction*. Paris: Nathan.
- Breitkreuz, Hartmut (1973). ‘False Friends’ und ihre unterrichtliche Behandlung. *Die Neuere Sprachen*, 22, 70-74.
- Carita, Maria de Lourdes (1999). *Heterossêmanticos-heterosemânticos: os falsos amigos entre o português e o espanhol*. Lisboa: Instituto de Inovação Educativa.

- Cartagena, Nelson & Gauger, Hans Martin (1986). *Vergleichende Grammatiken Deutsch-Spanisch*. Speyer: Duden.
- Cherpillod, André (2007). *Konciza etimologia vortaro*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Coromines, Joan (2008). *Breve diccionario etimológico de la lengua castellana*. Madrid: Gredos.
- Criado de Val, Manuel (1972). Falsos sinónimos. *Yelmo*, 8, 6.
- Davini, Gabriele & Pellizzari, Piero (1992). *Las trampas del hispano-italiano/ Le trappole dell'italo-spagnolo*. Padova: Tradutec.
- Debysser, Francis (1971). Comparaison et interférences lexicales (français-italien). *Le Français dans le monde*, 8, 51-57.
- Díaz González, José Joaquín (1975). *Falsos parecidos entre el español y el italiano: Curiosidades idiomáticas*. Roma: Esse-Gi-Esse.
- Downes, Leonard S. (1984). *Palavras amigas-da-onça: A vocabulary of false friends in English and Portuguese*. Rio de Janeiro: Ao Livro Técnico.
- DRAE XXII: *Diccionario de la Real Academia Española*. 22nd edition, <http://lema.rae.es/drae/> [30.10.2015]
- Dzhumberovna Khutsishvili [Джумберовна Хуцишвили], София (2010). *Славянские межъязыковые омонимы*. <http://old.press.tsu.ge/GEO/internet/disertaciebi/S.Khutsishvili%20Disertacia.pdf> [30.10.2015]
- Gociman, Anca & Bantas, Andrei (1976). Main aspects of deceptive cognates in English as compared to Romanian, Spanish and Italian. *Analele Universitatii București – Filologie*, 25, 45-52.
- Kirk-Greene, C. W. E. (1992). *NTC's Dictionary of Faux Amis*. Lincolnwood: National Textbook Company.
- Koessler, Maxime & Derocquigny, Jules (1928). *Les faux amis ou les trahisons du vocabulaire anglais*. Paris: Vuibert.
- Koutny, Ilona (2010). Esperantlingva bildo de la mondo. In Detlev Blanke & Ulrich Lins (Eds.), *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin* (pp. 290-305). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Kudela, Jean (1980). Processus de déétymonisation et typologie des 'faux-amis' français en serbo-croate. *Cahiers de l'Institut de Linguistique de Louvain*, 6, 153-180.
- Lodares, Juan Ramón (1987). Los falsos amigos. Un escollo en la enseñanza de las lenguas extranjeras. *Apuntes de Educación*, 24, 2-5.
- Malahovskij, L.V. [Малаховский, Л. В.] (2009). *Теория лексической и грамматической омонимии*. Санкт-Петербург, Либроком.
- Merino, José (1990). *Diccionario de dudas del inglés*. Madrid: Paraninfo.

- Moliner, María (1998). *Diccionario del uso del español*. 2^a edición. Madrid: Gredos.
- Orellana, Marina (1987). *La traducción del inglés al castellano (Guía para el traductor)*. Santiago de Chile: Editorial Universitaria.
- REVO: Reta Vortaro. <http://www.reta-vortaro.de/revo/> [30.10.2015]
- Schulte-Herbrügen, Heinz (1978). Polisemia y cambio semántico: verde y verdugo. *Verba*, 5, 47-61.
- Sanz Juez, Ángeles (1991). Hacia una metodología de la enseñanza del portugués a hispano hablantes. *Boca Bilingüe*, 8, 57-62.
- Sañé, Secundí & Schepisi, Giovanna (1992). *Falsos amigos al acecho. Dizionario di false analogie e ambigue affinità fra spagnolo e italiano*. Bologna: Zanichelli.
- Shmeliov, D. N. [Шмелев, Д. Н.] (2008). *Проблемы семантического анализа лексики*. Санкт-Петербург: ЛКИ.
- Suprun, A. E. [Супрун А.Е.] (1985). *Ответ на вопрос: каковы типы лексических омонимов в системе славянских языков (общее для всех славянских языков, индивидуальное)*. Сборник ответов на вопросы по языкознанию: к IV международному съезду славистов. Москва.
- Wandruszka, Mario (1975). Über die Natur natürlicher Sprachen. In Brigitte Schlieben Lange (Ed.). *Sprachtheorie*. Hamburg: Hoffman und Campe.
- Wandruszka, Mario (1976). *Nuestros idiomas: comparables e incomparables*. Madrid: Gredos.
- Wandruszka, Mario (1980). *Interlingüística. Esbozo para una nueva ciencia del lenguaje*. Madrid: Gredos.
- Waringhien, Gaston (2005). *Plena ilustrita vortaro de Esperanto [PIV 2005]*. Paris: SAT.
- Whitely, Melvin Stanley (1986). *Spanish/English Contrasts*. Washington: Georgetown University Press.
- Wilczynska, Weronika (1989). Un dictionnaire des faux-amis: pour quoi faire? *Le Français dans le monde*, 179-186

Maciej Paweł Jaskot naskiĝis en Varsovio en la 1981-a jaro. Ekde la 1988-a ĝis la 1994-a jaro loĝis en Romo. Post la reveno al Pollando li finis mezlernejon kaj komencis studi hispanan filologion en la Varsovia Universitato. Esperantistiĝis 16-jaraĝa, en la 1997-a jaro. En la 2004-a jaro komencis kunlabori kun la tiama E-Redakcio de Pola Radio. En la jaroj 2008-2011 li instruis la polan lingvon en la Fako pri Slavaj Lingvoj de la Universitato en Granada (Hispanio). Nun li neregule kunlaboras kun la Pola

RetRadio. Septembre de la 2013-a jaro li doktoriĝis pri ĝenerala lingvistiko kaj specialisto pri romanidaj lingvoj. En sia scienca agado okupiĝas pri lingvokomparado inter romanidaj kaj slavaj lingvoj kaj pri lingva realigado de kulturaj kodoj. Aŭtoro de du libroj (*Hispana ortografio por poloj* kaj *Eta vortaro de hispana frazeologio*) kaj de dekelkaj sciencartikoloj en hispana, rusa, pola kaj angla lingvoj. Aktuale li laboras en la Universitato de Sociaj kaj Humanismaj Sciencoj (SWPS) en Varsovio, kie li instruas hispanan gramatikon. Li kunlaboras ankaŭ kun la Varsovia Universitato kaj la Eŭropa Kolegio en Varsovio-Natolin (*College of Europe, Natolin Campus, Warsaw*).